

Novaĵoj Tamtamas

Internacia Gazeto de Esperanto Jokohama (Hama-Rondo)

エスペラントよこはまのエスペラント文会報

Niaj klasoj

***Eseoj:** gvidas Doi Hirokaz, en la Muzeo, en sabata posttagmezo. Oni finlegis “El malnovaj rakontetoj en vilaĝo Ihatovo”. Denove oni plulegos nefikciaĵon “Homoj manĝantaj”.

***Jokohama Salono:** sen gvidanto, per Jitsi, en sabato 15:00-17:00. Principe la 1-an kaj la 3-an sabatojn de monato oni legas “Paradizo Ŝtelita” de Trevor Steele (44% legita). La 2-an sabaton oni interkritikas sian liberan frazfaradon, kaj la 4-an sabaton oni interkritikas sian tradukaĵon el

materialo libere elektita.

***erikoj:** gvidas Doi Ĉieko, en la Muzeo, en merkredo 13:30-15:30. Finite pri “Nokto de la Galaksia Fervojo”. Oni eklegis nefikciaĵon “Homoj manĝantaj”.

***Teksantoj:** gvidas Doi Ĉieko, per Zoom, en lundo. Baldaŭ finlegota estas “Falantaj Muroj” de Trevor Steele.

***Verse:** gvidas Doi Ĉieko, per Zoom. Legata estas “Viktimoj” de Julio Baghy.

eseoj

Kun “Kiel akvo de l’ Rivero”

Itabaŝi Micuko

Antaŭe mi skribis eseon pri nia legadokunsido. Ni nomis ĝin ‘Pado’. Kiam mi retrovidis historion de Pado, romano “Kiel akvo de l’ rivero” havis tre gravan signifon por mia progreso en Esperanto. Ŝajnis al mi, ke mi iel kreskis kiel e-isto danke al ĝi kaj padoanoj. Jam ses el iamaj padoanoj forpasis, sed mi elkore dankas al ĉiu padoano.

En la romano “Kiel akvo de l’ rivero” ni vojaĝis en historio de antaŭ la unua mondmilito ĝis post la dua mondmilito laŭ la rakonto, kaj ankaŭ ni vojaĝis en vasta teritorio en Francio kaj Germanio. Certe la rakonto estas fikcia, tamen ĝi montris al ni gravajn aferojn, kiuj estus okazintaj en landolimo de Francio kaj Germanio, Parizo, Berlino, Metz aŭ Marseille.

En la legado ni unue koliziis kun nekonataj lokonomoj, kutimoj kaj naciecoj, kaj foje estis

konfuzitaj pro tiuj aferoj. Kiam mi estis lernanto en meza kaj altmeza lernejoj, mi lernis historiojn mondan kaj japanan. Mi ŝatis tiujn lecionojn, tamen mi ricevis nur ĝeneralan scion en ili. Certe la romano “Kiel akvo de l’ rivero” estas fikcia sed mi sentis, ke la aŭtoro volis transdoni ion sian opinion aŭ kredon en ĝi. Lia volo pli kaj pli tiris min en la rakonton. Kaj kiam ni finlegis ĝin, mi tre bedaŭris, ke mi jam ne povas legi ties daŭrigon.

Kiam ni legis la romanon, mia filo etis loĝanta en kvartalo Schöneberg (sjeneberk) de Berlino. Mi vizitis lin dufoje kaj restadis kelkajn semajnojn ĉe li. Tiutempe okcidenta kaj orienta Germanioj jam estis unuigitaj. Sed trafikaj linioj estis ankoraŭ tranĉitaj. Por iri ien mi foje ŝanĝis liniojn. Por iri centron de Berlino de lia apartamento mi uzis subterfervojon, ŝanĝis linion

ĉe Nollendorf-placo, kiu estis rakontita en la romano, kaj deveturis ĉe Zoo-stacio. De Zoo-stacio mi veturis ĝis Lützow-placo per buso. Ĝi aperis en la romano kiel loko, kie Pierre kaŝis sin kaj Annemarie trovis lin, kiam okazis la unua mondmilito. La placo estis tiel vasta, kvazaŭ oni povus okazigi basbalan matĉon. Laŭ unu rando de la placo estis pado, kaj ĝi etendiĝis laŭ rivero. La pado povis esti modelo, ke junulina grupo ekskursis. En la angulo de la placo estis kava loko ĉirkaŭita de arboj. Ankaŭ benkoj estis tie. La loko estis tute sama en la rakonto, kie Pierre pasigis maltrankvile nokton pro eksplodo de milito. Starante tie mi konjektis, ke la aŭtoro Raymond Schwartz starante vidus pejzaĝon, kiun mi vidas, kaj komponus parton de la rakonto. Paŝante, mi estis emociita, ke mi paŝas sur la pado, kiun li paŝus. De tiam la verko fariĝis tre intima por mi.

Mi ne memoras, de kiu parto ni spuris iradon de ĉefrolulo Pierre. Kvankam reale ni ne povis sekvi lin al Metz aŭ Marseille, ni kuniris kun li surmape. Kaj ni senintence lernis tiaman historion, vivon kaj pensmanieron de la roluloj. Danke al tiu sperto ni lernis, ke estis tre grave scii fonon de rakonto por kompreni personojn, kiuj vivas en rakonto.

Retrovidinte mi rimarkis, ke niaj legitaj verkoj estis preskaŭ tute originaloj.

Jen, estas ĉefaj verkoj, kiujn ni legis:

Naŭ rakontoj, kiuj estis en "Nova Esperanta Krestomatio"

Verdaj Donkiĥotoj: Julio Baghy

Kiel akvo de l' rivero: Raymond Schwartz

La ŝtona urbo: Anna Löwenstein

Metropoliteno: V. Varankin

La Zamenhof-Strato: Roman Dobrzyński

Neniu Ajn Papilio: Trevor Steele

Historio de kunul-bestoj de mia familio

SIBAYAMA Noriko

Antaŭ mia edziniĝo en mia hejmo ĉiam estis multaj bestoj, ĉar mia patrino ege amis bestojn. En sia infanaĝo ŝi ludis domon portante hundon sur sia dorso per ŝnuro anstataŭ bebon. Alia epizodo: ŝi ame tenis muson, kaj ĉiutage ŝi lasis ĝin el la fenestro de la dua etaĝo sur la tegmenton por promenado, kaj ĝi regule revenis hejmen. Sed iutage ĝi ne revenis.

Mia unua memoro pri hejmbesto de mia infanaĝo estas ŝpico (longhara blanka ĉambra hundo) nomata Lily. Kiam mi estis 5-jara, ĝi venis en mia hejmo. Mi kaj mia plijuna frato timis ĝin, kaj kaŝis nin sur tokonomo. Nun mi rememoras nur tiun scenon, ke mia patrino kolere postkuras Lily tenante balailon en la manoj. Lily forkuras kun furioza mieno. Mia impresio estis ke Lily havis tiel akran karakteron. Sed poste mia patrino diris, ke Lily estis certe foje agresema tamen ĝi tre bone zorgis siajn bebojn kaj kutime ĝi estis aminda. Ni kunloĝis kun kelkdek hundoj, tamen ni ne vidis tiel agreseman hundon krom Lily.

Ĉiumatene tuj antaŭ ekiro al lernejo, mi kaj mia patrino kutimis brosi mian uniformon (veston) por forpreni hundajn harojn de sur la surfaco. Malgraŭ tio kelkaj haroj restis sur la

vesto. Tial miaj klasanoj fojfoje demandis, "Ĉu vi havas katon?" Ĉu kato? Kial ne hundo? Ĉar tiutempe ĉambra hundo estis ege malofta, preskaŭ ĉiuj vizitintoj de mia hejmo surpriziĝis pro hundoj sur tatamo.

Kiam mia plijuna frato estis 13-jara, li loĝis en hospitalo dum unu semajno. Ĝuste tiutempe nia nova familiano, hundido, venis. Mia patrino kaj mi deziris montri la bebon al mia frato, kaj vizitis lin en la hospitalo kaŝe tenante la bebon sur brako. En lia ĉambro estis alia juna paciento. Ni metis la hundidon sur la lito por ke mia frato karesu ĝin. Ni nur timis, ke hazarde ĝi pisis sur la lito. Feliĉe la samĉambrano ŝajnis sin ne rimarki kaj eksteren iris. Mia frato maltrankvile diris, "Ĉu oni ne skoldos nin?" Sed neniu rimarkis.



La restoracio-ŝipo “Royal Wing” finis sian longan historion



Ĉe la haveno Jokohamo kaj en la golfo Tokio, olda krosŝipo “*Royal Wing*” (ロイヤルウイング, “Reĝa Flugilo”) jam longe veturis kiel restoracio-ŝipo, kaj estis amata de multaj turistoj en Jokohamo. Kelkfojojn tage, la ŝipo ekveturis de kajo Ōsanbashi kaj krozis en la golfo dum kelkaj horoj. Dum la eta krozo la pasaĝeroj ĝuis bonajn kuiradojn en la ŝipo.

Kiam okazis la Japana Esperanto-Kongreso en Jokohamo, 2017, ni planis ekskurson vojaĝeti per la ŝipo kaj havi manĝadon. Multaj ekskursantoj partoprenis, kaj sukcese ĝuis manĝon sur la maro de Jokohamo.

Tamen, je ĉi-februaro, la kompanio anoncis ke la servo de “*Royal Wing*” haltos senlime ekde la majo, pro la “diversaj aferoj rilate al la kronviroza pandemio”. Tiu novaĵo bedaŭrigis multajn jokohamanojn kaj turistojn, kiuj spertis kaj memoris la krosadon kaj bankedon de tiu ĉarma ŝipo. La “fina krosado” de la ŝipo okazis en la vespero de la 14a de majo. Ĉirkaŭ 200 pasaĝeroj havis adiaŭan bankedon sur la ŝipo.

La ŝipo naskiĝis en 1960 kiel “*Kurenai-Maru*” (くれない丸), por perioda ŝiplinio inter Osako kaj Beppu, trairente Internan Maron Seto.

Tiuepoke, la ŝiplinio estis tre fame konata kaj ŝatata por vojaĝantoj, precipe por mielmonataj turistoj, pro tiu bela pejzaĝo kaj oportuneco vojaĝi al la termofonta ripozejo Beppu. La nova ŝipo “*Kurenai-Maru*” estis pli luksa kaj rapida ol malnovaj ŝipoj. Kaj la ŝipo, kun la

NAMBA Fumiharu

karesnomo “Reĝino de La Interna Maro Seto”, longe portis multajn vojaĝantojn.

Tamen, ekde 1975, kiam rapida trajnlinio *Sanyo Shinkansen* nove atingis al Hakata (Fukuoka), vojaĝantoj de tiu malrapida ŝiplinio tuj malmultiĝis. Pro tio, je 1980, finfine “*Kurenai-Maru*” ĉesis pri sia krosado en la maro Seto.

La ŝipo estis vendita, kaj reformita al restoracio-ŝipo. Ekde 1989, kun la nova nomo “*Royal Wing*”, la ŝipo komencis emeritan vivon en haveno Jokohamo.

Tial, la ŝipo estas 63-jaraĝa nun, kaj jam ĝi estas la plej malnova “vivanta” pasaĝerŝipo en Japanio. Supozeble, tiu troa malnoveco ankaŭ estas kialo de la “halto senlima”.

En la anonco de la kompanio, troviĝas jena informo. “Ni planas konstrui novan ŝipon anstataŭigonte nunan ŝipon. La progreso de tiu plano aperos en nia retejo kaj aliaj informiloj.”

Tial, ni volas atendi la tagon, kiam la nova ŝipo ekveturos de la kajo Ōsanbashi kun multaj pasaĝeroj kiuj ĝuos bonan apetiton !



rakonto

[memore al nia bedaŭrata leganto s-ro Ji Yin'geng en Ŝanhajo, Ĉinio]

Rakonto pri simio


rerakontis Ji Yin'geng

Ĉi tio estas rakonto pri simio. Ĝi estas la simio de maljunulo. La maljunulo tre ŝatas sian simion. La simio estas tre saĝa. Kiam birdoj alflugas al la dormanta maljunulo, ĝi ilin forpelas. Ĝi multe helpas la maljunulon alimaniere. Ekzemple, ĝi prenadas al li ĵurnalon, cigaredon eĉ teon kaj aliajn. La maljunulo ofte dormas tage sidante sur seĝo en sia ĝardeno. La simio ĉiam sidadas apud la maljunulo kaj forigadas muŝojn de sur la vizaĝo de la maljunulo.

Varman posttagmezon en somero la maljunulo endormiĝis sur sia seĝo. Muŝo alflugis kaj

fiksiĝis sur la pinto de la nazo de la maljunulo. La simio ĝin forigis, baldaŭ la muŝo revenis kaj fiksiĝis sur la nazo de la maljunulo refoje. La simio ĝin forigis refoje. Ĝuste tiel la simio ĝin forigis kvin aŭ ses fojojn.

Fine ĝi koleriĝegis. Ĝi eksaltis, forkuris kaj alprenis larĝan ŝtonon. Kiam la muŝo refiksiĝis sur la nazo de la maljunulo refoje, la simio peze ĝin batis per la ŝtono. Ĝi mortigis la muŝon sed samtempe ĝi ankaŭ rompis la nazon de la maljunulo.



el Trevor Steele (Aŭstralio)

Mi ĝojas pri via omaĝo al "Verda Majo", kvankam la tiama japana registaro rigardis ŝin ŝtatperfidulo.

Estas bone, ke en kelkaj landoj oni ne hezitas kondamni la agojn de la propra registaro, ĉar bedaŭrinde, kiel diris la fama usona ĵurnalisto Izzy Stone, "ĉiuj registaroj mensogas".

Gratulon.

Trevor Steele

el Anatolij Ionesov (Uzbekio)

Dum pluraj jaroj sufiĉe regule mi korespondis kun Kiyoshi-san kaj lia fidela vivkunulino Yayoi-san kaj foje mi havis ŝancon bonvenigi ilin - akompane de aliaj japanaj esperantistoj - en mia hejmo.

Nome de mia familio mi esprimas al vi ĉiuj samkiel al parencoj de s-ro Aida Kiyoshi niajn profundajn kaj elkorajn kondolencojn.

Esperantistaj geedzoj Aida Kiyoshi kaj Yayoi por ĉiam restos en nia memoro!

Kunsente viaj,
Anatolij Ionesov kaj familio

el Franciska (Aŭstralio)

Verda Majo certe estas ekzemplo de esperantisto kies idealo ne nur estas vorta.

Amikajn salutojn,

Franciska

Aŭstralia Radio legis niajn artikolojn

(januaro-majo 2023)

elsendo de la 16a de januaro 2023

el Novaĵoj Tamtamas numero 380 "Florekspozicio okazos en 2027" de Sibayama Zyun'iti

elsendo de la 10a de aprilo 2023

el Novaĵoj Tamtamas numero 383 "En Marto" de Itabaŝi Micuko

elsendo de la 29a de majo 2023

el Novaĵoj Tamtamas numero 385 "Monumento de Hasegaŭa Teru inaŭgurita" de Doi Ĉieko